

PENSEO

N-ro 371

sept. / 2022

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 33-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

Ángel Arquillos (Hispanio)



la granda lago

Kun granda timo mi naĝas
sur tre vasta blua lago,
malgraŭ ke min ja timigas...
la mistera profundaĵo
kaj la malhela vespero
kaj la konstanta soleco
kaj via longa silento
pro mia nova fiasko.
Mi naĝas dum ĉe la bordo
atendas mia ĉagreno
prizorgante la vestaĵojn
makulitajn de malbono.

Mi naĝas, ĉar la mensogo
per ĝiaj faŭkoj venenaj
kontraŭ mi la tutan tagon
ridetante faras mokon.
Mi naĝas kun la kvieto
kun granda tim', sed kun zorgo
ĉar mi timas la mallumon
kaj la glacian malvarmon.
Kia granda timo, Dio
naĝi sola sur la lago,
kie la profundo grandas
kaj sterniĝas la grando.



Gao Jun (Ĉinio)

Rigardo al la maro

Kiam la somero ŝajnas ŝancelpaŝa infano
kaj la timida aŭtuno montras ruĝajn vangojn,
la maro estas tre simpla
simpla kaj naiva kiel infano.
Nun ni iru rigardi la maron!
Sub la sunbrila ĉielo
la maro bluas kvazaŭ
entenante la tutan ĉielon.

Infanoj el ni svingas flugilojn
birde flugas kun leĝero.

El la ĉielo mi ekkomprenas,
ke la kotonsukeraĵo de mia knabeco
naskiĝas el nuberoj.

Marondoj mildas,
ĉiuj volas ĝui ilian romantikecon.
Ŝajne en ili sin kaŝas rakontoj,
sed ili misteras kiel plenkrekulaj okuloj,
neimegeble!

Marondoj, plaĝo, piedspuroj,
vespero, sinkanta suno, vesperruĝo
kaj kordoj kun orbriloj
konsistigas senvortan poemon,
sed versverkanto kaj verslegantoj
ne komprenas la senton en ĝi.

El la ridsonoj de la infanoj
mi sentas, ke la maro estas naiva.

El la okuloj de la infanoj
mi vidas la romantikecon de la maro.

Ĝi neniam faras plendojn.

Moissey Bronshteyn (Rusio)



Flankiĝinte foren de la politikoj,
de akuzoj krudaj, laŭtaj, reciprokaj,
kiuj nun plenigas sen skrupul' Fejsbukon,

tamen opinion certan havas mi kaj
ĝin ne timas montri rekte dum parol' kaj
ne vagadas ruze en alud-nebul' kun

ridetaĉ' insida rande de la buŝo.
Ĉiam mi kompatas vere kun kortuŝo
morton de la viroj junaj ambaŭflanke,

la agreson nomas nur agres', sen fuŝo,
kredas, ke la mondo venos al akuŝo
de la perspektiva kaj efika plan', ke

vera vero venkos per komuna volo,
trompo ne surbenkos eĉ sur unu colo,
ĉar prudento devas savi la homaron.

Ve, en mia kredo estas tro da folo,
ĉar aliajn kantojn kredas la popolo...
Kaj la kor' mergiĝas funden, en amaron.

** **

La tulipoj "Esperanto" unuafoje ekfloris en
mia ĝardeno.

Neglektas militon tulipoj –
flore gas en varmo de majo,
donacas al ni, ekzilitoj,
almenaŭ kvanteton da gajo.
Ĉi tiu kvanteto kantete,
tenere la koron karesas,
kaj ĉies humoro nun nete

kun freŝa fervoro progresas,
kaj ĉiu sekvanto de l'kanto,
enspiras frivolan aromon
de l' milda tulip' "Esperanto",
en si retrovante la homon.



** **

Sciu,
mi vidis anĝelon en suna radio.
Tiu
diris, ke certe helpos li min hodiaŭ,
nur mi
tuj rapidu formuli deziron mian,
turni
miajn revojn sekretajn kaj montri ĉion,
kio
mian animon nun turmentas rabie –
fio
mava, kiun renkontas mi nur vekrie.

Kaj mi
konfesis al la anĝeleto edena:
ŝajni,
ke estis mi ĉiam sur vojo ebena,
povas
en sonĝo agrabla aŭ en halucino.
Trovas
nur padojn montarajn kaprica destino.
Ŝtonoj
kaj dornoj abundas do dum mia iro,
sonoj
de korvoj malsataj por mi, la martiro.

Tamen
mi kredas, ke restis kuraĝo por paŝi,
famon
ne ĉasi kaj pensojn liberajn ne kaŝi,
bridi
la stultan orgojlon kaj ventajn inklinojn,
fidi
nur miajn amikojn kaj miajn virinojn,

rimi
la pensojn leĝere ĉe krea impeto...
Pri mi
ne zorgu, sed restu kun mi, anĝelete.

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Longa tago de paŝtistoj

Al paŝtistoj en Timoro

Kiam la suno ĵus aperas,
grupo de bovoj bruon kreas,
ili forlasas la stalon kaj iras al savano,
al la loko por manĝi kaj trovi sunlumon.

Tri knaboj gardas tiujn ĉi bovojn
kaj alkondukas ilin al vasta savano
estanta riĉa en herboj freŝaj:
bongusta manĝaĵo por bovoj gardataj.

Dum la bovoj plenigas la stomakon,
la paŝtistoj elektas unu arbon
kun bona ombro por kune ripozi.
Rakonto, legendo, rido plenigas la
savanon.

Kiam la suno estas precize super la kapo,
la paŝtistoj alkondukas siajn bovojn al
akvo
por forigi iliajn soifon kaj ŝviton.
La bestoj trinkas en akvo fluanta.

Baldaŭ, pura akvo estos forlasata
ĉar soifo kaj ŝvito forlasos la korpon.
La vasta savano atendas vizitantojn.
Paŝtistoj kaj bovoj tien iros.

Horon post horo, minuton post minuto,
la suno jam preskaŭ iras for
forlasante la paŝtistojn kaj iliajn bovojn.
Do, baldaŭ alvenos la nokto.

Moviĝante sampase, plene je ĝojo,

belsona fluto akompanas la bovojn al stalo.
Jam finiĝas la longa tago.
Morgaŭ matene ili denove renkontiĝos.

KIAM TEKSISTINO FINAS LABORON

Rigardu ridetan vizaĝon, kiam oni preskaŭ
forprenas la teksaĵon,
por tondi la fino-fadenojn kaj bone gardu la
virsarongon[1]
ĝis kiam alvenas la momento por ĝin porti,
por montri la glatecon kaj belecon de fingroj.

Ekde pasinteco ni konservas kaj gardas bonan
scion,
kiun niaj inteligentaj kaj diligentaj praavoj
donis al ni
por daŭrigi kaj fruktigi ĝin por ke ĝi postvivu
malgraŭ jarcentoj pasas for el la vivo.

Kiam ni portas virsarongon, kiu nin faras bela
kiel reĝo,
ni rememoru la longajn tagojn en
teksado-budo,
kiam la menso kaj la koro marŝis kune
nur por ke la bela laboro finiĝu.

*vorsarongo:

Jadranka Miric (Serbio)



Sen vi

Fine ekis longe atenditan freŝecon
Bonvenigas ĝi al maljunuloj
sed ankaŭ al bravuloj
kiu tuttage sunumis por gajni
haŭtbrunecon!
Milda venteto tenere nin
karezas pe ĝia freŝa tuŝado. Ĉu vin
doloras mia neatendita malĉeesto
aŭ vin pli zorgas tiu somera tempesto?
La mondo rapide ŝanĝiĝas
ne nur klimato sed pro fia

kreskanta maltoleremo. Ĉu en via
koro la ŝveliganta malamo nestiĝas?
Aŭ kiel kutime vi dirus:
Ne ŝovu vian nazon en fremdan vazon!

Ivanichka Magharova (Bulgario)



Pastorala

La herbo sonĝas
falantajn pluvgutojn,
la verdarbaron
kaj mildan venton.

La herbo sonĝas
la blanknebulon.
bonodorflorojn
kaj la kanton de l' birdoj.

La herbo sonĝas
sub la sunkareso
nudpiedetojn
en freŝmatena roso.

La herbo sonĝas
klaran fonon,
la ŝaŭman riveron
kaj la bordon ĉe la roko.

La herbo sonĝas
ridojn de la infanoj
kaj senfinan vastaĵon
de sunvarmigita.

MI SONGĜAS la herbon
de mia infaneco!



Ora monero

(armena fabelo)

Iam en la vilaĝo vivis unu junulo, kiu decidis edziĝi.

Li Iris al sia patro kun peto ricevi benon por grava paŝo en la vivo.

Sed la patro diris al li,

—Mi benos vin nur tiam, kiam vi montros al mi oran moneron, kiun vi mem salajris.

Junulo ekmemoris, ke li havas unu oran moneron kaj decidis rapide montri al la patro.

La patro prenis moneron kaj forĵetis ĝin en riveron.

—Vi ne salajris ĉi-tiun moneron.

Junulo, pripensis kaj petis patrinon helpi al li kaj doni unu oran moneron.

Sed la patro denove rigardis kaj forĵetis la moneron en la riveron.

Kion fari, junulo trovis laboron kaj post ioma tempo, ricevis oran moneron kiel salajron por farita laboro.

Kiam li venis al la patro kaj donis sian oran moneron kaj patro denove levis manon por forĵeti moneron, junulo ekkriis,


—Bonvolu, patro, ne forĵetu, mi tiel longe kaj malfacile laboris, kliniĝis dorson por salajri oran moneron.

—Jes, mi kredas, kara filo, nun vi scias valoron de la laboro kaj neniam forĵetos monojn sen neceso.

Vi povas krei vian propran familion.



Tradukis



Rita Mkrtĉjan

(Armenio)

Elena Popova (Bulgario)



La konsilo de iu saĝulo

Estis dum iu frosta vintro, kiam estis financa, ekonomia kaj aliaj krizoj, kiam la banko bankrotis, la magazenoj estis malplenaj...

Mi eniris toto-punkton. Post mi eniris mezaĝa virino, ekparolis kun la oficistino kaj ekfumis. La ĉambreto estis malgranda kaj rapide pleniĝis kun fumo. La oficistino silentis. Mi rimarkigis al la fumantino, ke tie ĉi ne estas loko pri fumo. Tuj ŝi ĉesis miajn vortojn kaj insultis min... Mi rapide pagis kaj eliris.

Nun mi rakontos legendon, kiun mi legis.

Antaŭ multaj, multaj jaroj, kiam la tabako estis alportita al Armenio, en iu vilaĝo loĝis maljunulo, kiu estis tre saĝa kaj homoj kredis liajn vortojn.

La saĝulo iam vidis, ke grandega homamaso kolektiĝis ĉirkaŭ eksterlandaj komercistoj pri tabakaj semoj kaj folioj. La komercistoj kriis:

— Dia folio! Ĝi helpas pri ĉiuj malsanoj!

Mi devas diri al vi, ke en la komenco la homoj pensis pri tabako kiel kuracilo, sed multe pli poste evidentiĝis, ke ĝi estas vera veneno, kiu malrapide malsanigas kaj mortigas la fumanton kaj la ĉirkaŭantojn, kiuj enspiras fumon en la ĉambro.

La vilaĝanoj aŭskultis la komercistojn kun malfido. Tiam la saĝa maljunulo alproksimiĝis al ili, prenis kelkajn foliojn en la mano kaj diris:

—Ĉi tiu "Dia" folio alportas al homoj alian avantaĝon — ŝtelisto ne eniras la hejmon de la fumanto, la fumanto ne estas mordita de hundoj kaj neniam maljuniĝas.

—Klarigu al ni viajn vortojn, saĝa maljunulo! —demandis la ravitaj komercistoj.

—Ŝtelisto neniam eniras la domon de fumanto, ĉar li tusas la tutan nokton kaj ne povas dormi, kio signifas, ke li sentos ĝin. Post kelke da jaroj da fumado, homo malpeziĝas kaj ekmarŝas kun bastono, kaj kiu hundo mordos homon, se li havas bastonon? En la fino, la fumanto ne maljuniĝos, ĉar li mortos juna...

La vilaĝanoj aŭskultis la vortojn de la maljunulo, rifuzis aĉeti tabakon kaj foriris.

Mi pensas nun — Ĉu la fumantoj legas legendojn?



Lupiro Borĥert

LUMTURO VOLUS ESTI MI

Lumturo volus esti mi
en nokt' kaj vent'
por ĉiu fiŝ' laŭ sent',
por boat' en fon',
kaj estas mem nur
ŝip' en bezon'.

tradukis



Hans-Georg Kaiser

(Germanio)



Profunda Maro

Ho blua profunda maro,
Kial torentas l'ondaro?
Same al amato mia,
Sen stabileco pasia.
Ho vigla maristo juna,
Parolu al mi laŭvere!
Pri mia amato nuna,

Kie estas li surtere?

L'embarraso de amo

Neniel konas vi la amon,
ignoras tute la deklamon.
Parolo iĝas tiel ŝpara,
Afero restas do malklara.

Diskuto temas pri la vojo,
konkludas tamen kun malĝojo.
La renkontiĝo jam eraras,
kunvivi pace ni ne paras.

Neniam vi komprenas amon,
estingos baldaŭ ĝian flamon.
Apude estas la nebulo,
kaj inter ni ekzistas muro.

Nebula sonĝo sen la celo,
kaj mankas ĉiam la fidelo.
Mi embarason ne deziras,
neeble tamen ĝin retiras!

Spiro primavera

Vigle al Palac' Somera*
venas spiro primavera.
Sur la monto kun verdhel'
staras mi sub bluĉiel'.

Ŝvebas la easta vento,
oni ravas kun bonsento.
Ridas mia arda kor'
al la suno kiel flor'.

*Palaco Somera estas la ĉina reĝa palaco en Pekino.

Elĉinigiŝ



Yi Qiao (ĉino en Germanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Lu You (1125-1210)

Ulmeo

—laŭ melodio *Aŭguristo*

Ekster poŝtodomo, ĉe rompita ponto
ŝi disfloras sola sen kompano.
Ĉe l' vesper' ŝi ĉagreniĝas
sub vent-vip' kaj en pluvbano .

Ŝi ne emas beligi sin por printempo,
ignorante la aliajn florojn kun envia
flamo.
Kiam ŝia petalaro falas en la koton,
ŝia bonodor' ankoraŭ restas en la samo.

—laŭ melodio *Nokta vizito al palaco*

Frumatene post neĝado
sonas melodie flutario.
Songe mi troviĝas jen en kia loko
ekster mia scio.
La ĉevalrajdistoj flue militiras
silenteme laŭ la vojlinio
al landlimo ĉe l' uest-pasej' de Yanmen
aŭ ĉe Qing'hai-laga pozicio.

En lamplumo frosta mi vekiĝas,
la klepsidro fluis jam ne plu.
La lunlum' oblikve riveliĝas
sur papero de l' fenestr' sen sku'.
Mi junaĝe jam pretendis,
ke mi gvidos trupon ĉe l' limsitu'.
Sed nun miaj haroj grizas ĉe tempio,
mi ankoraŭ kovas ambicion jen kun ĝu'!

—laŭ melodio *Ĉarmas aŭtunaj ondoj*

En urbet' ĉelima kornoj triste sonas,
sur teraso alta fajrofum' leviĝas pacsimbola.
Akompane de frapado de muzikaj iloj,
supreniras mi altaĵon kun trankvilo kora
verŝi vinon por ofer-ceremonio.

Kian ĝojon sentas mi kun sento fola!

La plej simpatia luno en la sudo
el vesperaj nuboj jen elvenas speciale.
La salikoj en nebulo ĉe Baqiao
kaj kiosk' kaj pavilono ĉe la lago joviale
sopireme jen atendas honorindajn gastojn
kiuj faros vizitadon festivale.

—laŭ melodio *Printempo en palaco*

Kun pafark' ĉizita, sagoj, falk' enmane
ĉasis ni jen ĉe antikva la fortres' de tero
aŭ mortigis tigrojn sur la ebenaĵo.
Je signaloj de flutsonoj ĉe vespero
ni reiris al la neĝkovrita tendo.
Dum drinkado, ja pro vin-instiga pelo,
mi penikon svingis, skribis
la kaligrafiaĵon dancsimilan sur papero.
Mi rikoltis ĉies laŭdojn
kiel generalo kaj poeto kun fiero,
kiu brilas per talento de beletro
kaj militaj pensoj en supero.

Kiu scias, kial mi al sudo venas
nur por spekti la bazaron en libero,
la lanternan monton ĉe la festo.
Kiam floroj buntas en prospero,
mi promenas rajde sen bridado,
trairante inter homoj laŭ prefero.
Aŭskultante al kantado mi nereteneble
rememoras pri malnova kariero,
kaj ekploras ja sen regi min mem.
Ho, memoru, ke meritfarad' dependas
de la homo, sed ne de l' ĉielo!

AL MIA FRATO

—laŭ melodio *Fiŝista fiero*

Mi rigardas orienten,
kie estas mia hejmvilaĝo kara?
Ja dektri mil liojn oni devas iri
tien de ĉi tie kaj reiri sen obstaklo bara.
La leterfolion plenan je skribaĵoj
mi forsendas al la hejm', kun larmo fala,
la respondon el la hejmo tamen

nur alvenos jen en temp' venontjara.

Mi konfidas al akvfluo sub la ponto
la mesaĝon pri l' renkontiĝa dato.
Kiam povos mi veturi per boato
por lin vidi, mia kara frato?
Mi jam oldiĝas, vagadante
en tereno fora kvaz' nomado.
Mi maldormas pro ĉagreno,
ja kun vanaj jaroj en kaduka stato.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Seng Huihong (1071 – 1128)

Pendolo

Du verdaj ŝnuroj de pendol' svingiĝas
lertamove
Printempe balancilas belulino antaŭ l' domo.
La ruĝa jupo flirtetanta trenas sin surtere,
Dum la knabino alpuŝiĝas al ĉiela fono.
La sidtabulon malsekigas floroj abrikotaj,
Oblikve pendas tiuj ŝnuroj en ĉi brumo.
Ŝi glate surteriĝis kaj gracie staras tie,
Ja kvazaŭ la feino ekzilita el la luno.

Xu Fu (1075 - 1141)

Printempa ekskurso ĉe lago

Kiam do hirundoj reflugos pare en feliĉo?
Floras persikarboj ĉe borde, akvon tuŝetante.
Kaj netraireblas la ponto pro akvoleviĝo,
sed pramo el ombro salika aperas mallante.

Li Gang (1083 - 1140)

Malsana bovo

Vi plugis kaj produktis multe da riz-greno,
sed kiu vin domaĝas pri l' laciga peno?
En vesperruĝo mi preferus morbe kuŝi,

se la popolo sin satigus sen problemo.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-NAŬA

Zhi la rabisto

§29-01

Konfuceo havis amikon nomatan Liuxia Ji, kies pli juna frato estis konata kiel “Zhi la Rabisto”. Tiu ĉi homo organizis bandon el naŭ mil homoj, kiuj senbride faris rabadon en la tuta mondo, invadante la teritoriojn de diversaj regnoj. Ili enrompis privatajn loĝejojn, forrabis brutojn kaj perfortis virinojn. Ili estis tiel avidaj pri riĉaĵoj, ke ili eĉ ne indulgis siajn proksimajn parencojn; kaj ili estis tiel malpiaj, ke ili neniam faris oferadon al siaj prapatroj. La aperoj de la bando de Zhi minacis ĉiujn urbojn de diversaj regnoj, el kiuj la grandaj plifortikigis siajn remparojn, dum la malgrandaj sin ŝirmis en siaj fortresoj. La popolo de la tuta mondo suferis grandajn malfeliĉojn kaŭzitajn de tiuj banditoj.

Konfuceo diris al sia amiko Liuxia Ji:

“La patroj devas admoni siajn filojn; la pli aĝaj fratoj devas gvidi siajn pli junajn fratojn. Se ili tion ne faras, kial do la patroj kaj la pli aĝaj fratoj estus estimataj? Nun vi, sinjoro, estas indulo en la socio, dum via frato estas la rabisto Zhi. Li fariĝis la plago de la mondo kaj vi malsukcesas lin gvidi. Mi private hontas por vi. Mi petas, ke vi permesu al mi iri persvadi lin en la nomo de vi.”

“Vi diris,” diris Liuxia Ji, “ke la patroj devas admoni siajn filojn, kaj la pli aĝaj fratoj devas gvidi siajn pli junajn fratojn. Kaj tamen, se la filo ne aŭskultas la admonon de sia patro, aŭ la juna frato

rifuzas sekvi la gvidon de sia pli aĝa frato, kion do oni faru eĉ havante tian elokventecon, kian vi havas? Cetere, Zhi estas homo kun menso tiel vigla, kiel ŝprucfonto, kaj kun humoro tiel kapricanta, kiel neatendita ŝtormo. Lia forteco kaj maltimeco estas sufiĉaj por timigi kaj venki siajn malamikojn, kaj lia elokventeco estas sufiĉa por ŝminki aŭ kovri siajn kulpojn. Li ĝojas kiam oni lin obeas; li koleras kaj uzas krudajn vortojn kiam oni lin malobeas. Kредu al mi, vi neniel devos iri lin viziti.”

Ignorante la konsilon, Konfuceo, kun Yan Hui kiel kaleŝo-kondukanto kaj Zigong sidanta ĉe lia dekstra flanko, iris viziti la rabiston Zhi.

Ĉe la suda piedo de la monto Tai Konfuceo trovis la rabiston Zhi, kiu tiam faris ripozon tie kun sia bando. Oni dishakis homajn hepatojn por fari rostitan frandaĵon por li. Eliĝinte el la kaleŝo Konfuceo iris antaŭ la gardiston kaj diris:

“Mi estas Konfuceo el la regno Lu. Survoje mi aŭdis, ke via generalo estas homo altmorala kaj honesta. Mi petas vin raporti mian viziton kaj transdoni mian saluton al via ĉefo.”

La gardisto eniris kaj anoncis pri la alveno de Konfuceo. Aŭdinte tion la rabisto Zhi furioziĝis tiel ke liaj okuloj ĵetis fajrerojn kaj liaj haroj rekte stariĝis. Li muĝis:

“Ĉu li ne estas la ruza kaj hipokrita Konfuceo el la regno Lu? Diru al li en mia nomo: ‘Vi uzas afektitajn vortojn kaj pretendas esti advokato de la reĝo Wen kaj de la reĝo Wu de la dinastio Zhou! Kun kapvesto ornamita per sekiĝintaj branĉetoj sur via kapo, kun larĝa zono el bova ledo ĉirkaŭ via talio, vi iras tien kaj tien, parolante sensecaĵojn. Vi ĝuas fajnajn nutraĵojn, sed vi plugas nenian kampojn; vi portas belajn vestojn, sed vi teksas nenian ŝtofon. Via lerte svingata lango provokas tiom multe da malordoj, ke la princoj estas konfuzitaj kaj la kleruloj estas detenataj de reveno al sia denaska naturo. Sub la preteksto prediki la respekton de filo al siaj gepatroj kaj la respekton de pli juna frato al siaj pli aĝaj vi provas akiri al vi, per hazardo, favorojn de nobeloj kaj riĉeguloj. Vi ja kulpas je la plej abomenindaj krimoj. Tuj for de ĉi tie, aŭ mi aldonos vian hepaton al miaj tagmanĝaj frandaĵoj!’”

Konfuceo refoje faris la peton: “Ĉar mi havas la

honoron konatiĝi kun via frato Liuxia Ji, mi deziras paroli persone kun via generala moŝto.”

Aŭdinte la duan raporton de la gardisto, Zhi ordonis: “Venigu lin ĉi tien!”

Konfuceo rapide eniris en la tendon, sed, anstataŭ preni la sidlokon, li retroiris kelkajn paŝojn de tie, kie Zhi sidis, por riverenci al tiu ĉi. Zhi, ĉe la vido de Konfuceo, ekkoleris kaj furioze rigardis lin per rondigitaj okuloj, kun la kruroj disetenditaj kaj la dekstra mano metita sur sia glavo. Li muĝis kiel leono:

“Alproksimiĝu, Konfuceo! Sciu, ke via vivo nun dependas de viaj vortoj. Se tio, kio vi diros, plaĉos al mi, vi vivos; alie, vi pereos.”

“Mi aŭdis,” diris Konfuceo, “ke la homoj en la mondo havas tri virtojn. Esti naturdotita per granda staturado kaj larĝaj ŝultroj, havi senegalan belecon, plaĉi al la homoj junaj kiel al la maljunaj, al la homoj noblaj kiel al la malnoblaj, — jen la virto supera. Ampleksi per sia inteligento la ĉielon kaj la teron, povi distingi ĉiujn estaĵojn inter ili, — jen la virto meza. Havi kuraĝon kaj bravecon, decidemon kaj aŭdacon, kaj la kapablon kolekti homojn ĉirkaŭ si kaj komandi ilin por batalado, — jen la virto malsupera. Tiu, kiu posedas nur unu el la tri virtoj, estas inda reĝi super la mondo.

“Nu, generalo, mi konstatas, ke vi havas ĉiujn el la tri samtempe. Via staturado altas je ok ĉi-oj kaj du *cun*-oj. Vi havas sanan vizaĝkoloron, brilajn okulojn kaj vermilionajn lipojn. Viaj dentoj estas kiel du perfekte aranĝitaj perlovicoj, kaj via laŭta kaj klara voĉo sonas kiel sonorilo. Sed vi nun estas nomata Zhi la Rabisto. Mi hontas en mi pri via fifamo, kiun vi efektive ne meritas. Se vi volos sekvi mian konsilon, mi volonte iros al la regno Wu kaj la regno Yue en la sudo, al la regno Qi kaj la regno Lu en la nordo, al la regno Song kaj la regno Wei en la oriento, al la regno Jin kaj la regno Qin en la okcidento, por provi persvadi iliajn suverenojn, ke tiuj cedu ĉiu parton de sia teritorio kaj fondu por vi grandan urbon de centoj da lioj. Vi estos farita princo reganta super cent mil familioj, se tio plaĉos al vi. Per tio vi povos fari novan komencon kune kun la popolo de la mondo kaj faros pacon kun la najbaraj regnoj, malmobilizos viajn soldatojn, kunigos kaj nutros viajn fratojn kaj faros oferadojn al la prapatroj. Tiaj agoj ne nur konformos al tio, kion la

saĝuloj kaj virtuloj devas fari, sed ankaŭ kontentigos la deziron de la ordinara popolo.”

Fariĝinte ankoraŭ pli furioza, Zhi la Rabisto hurlis:

“Alproksimiĝu, Konfuceo, kaj aŭskultu! Tiuj, kiuj povas esti persvaditaj per elokventaj paroloj kaj logataj per materiaj profitoj, estas nenio alia ol vulgularuloj malkleraj. Mi ŝuldas al miaj gepatroj la virton havi grandan kaj belan staturon, kiu estas plaĉa al ĉiuj. Ĉu mi mem ne scius pri tio, eĉ se vi ne laŭdus min ĉi tie?”

“Cetere, mi aŭdis ankaŭ, ke tiuj, kiuj emas laŭdi iun ĝuste en ties vizaĝon, emas ankaŭ mallaŭdi tiun postdorse. Via propono starigi urbon kaj igi min reĝi super la popolo egalas logi min per materiaj profitoj kaj trakti min kiel vulgularulon malkleran. Sed supozu, ke se mi akceptus vian proponon, kiel longe tio ĉi povus daŭri? Nenia urbo povas esti pli granda, ol la tuta reĝlando. La reĝo Yao kaj la reĝo Shun iam regis super la tuta lando, sed iliaj posteuloj ne posedis eĉ la plej malgrandan pecon da tero. Ankaŭ la posteuloj de la reĝo Tang de la dinastio Shang kaj la reĝo Wu de la dinastio Zhou, kiuj iam estis “Filoj de la Ĉielo”, estis ĉiuj ekstermitaj. Ĉu iliaj malfeliĉoj ne originis el ilia akiro de tro da materiaj profitoj?”

“Mi aŭdis ankaŭ, ke en la praantikveco troviĝis pli multe da rabobestoj ol da homoj, kaj por eviti sovaĝajn bestojn, la homoj konstruis por si loĝejojn sur arboj. Tage ili kolektis glanojn kaj kaŝtanojn; nokte ili dormis sur la arboj. Jen kial ili estis nomataj ‘nestohomoj’.

“En tiu epoko la homoj ne sciis la uzon de la vestoj, ĉar ili kolektis brullignojn en la somero kaj bruligis ilin en la vintro por sin varmigi, kaj tial ili estis nomata ankaŭ “homoj, kiuj sciis vivi”. En la epoko de Shennong, la Dia Terkulturanto, oni dormis trankvile kaj ellitiĝis senzorge. Oni konis sian patrinon, sed ne sian patron. Ili vivis kun elafuroj; oni kulturis la teron por sin nutri kaj teksis ŝtofon por sin vesti. Neniu havis la intencon fari malbonon al aliaj. Tio estis la epoko, en kiu la virto perfekta prosperis.

“Post tio la Flava Imperiestro ruinigis la virton per siaj bataloj kun Chiyou en Zhuolu, kun la sango verŝita sur la ebenaĵon vastan je cent lioj. Kiam la reĝo Yao kaj la reĝo Shun surtroniĝis, estis starigita la regnificista hierarkio. La reĝo Tang ekzilis sian suverenenon Jie kaj la

reĝo Wu mortigis sian suverenon Zhou. Ekde tiam, la fortaj tiranis la malfortajn; la plimulto subpremis la malplimulton. Ekde la epoko de Tang kaj tiu de Wu ĉiuj monarkoj estis uzurpintoj, kiuj alportis nur malordon al la popolo.

“Nun vi studas la strategiojn pri la regado de la reĝo Wen kaj la reĝo Wu por orienti la publikan opinion kaj starigi gvidajn principojn por la estontaj generacioj. Portante malstriktaĵon kun larĝa zono, kiu estas la tipa klerula kostumo, vi parolas kaj agas en tre afektita maniero kun la celo trompi la princojn kaj dukojn de la mondo, por akiri al vi pli da riĉaĵoj kaj honoroj. Ja neniu rabisto estas pli malvirta, ol vi! Kial do vi ne estas nomata Konfuceo la Rabisto? Kial do mi estas nomata Zhi la Rabisto?

“Vi delogis Zilu per viaj trompaj elokventaĵoj, tiel ke li, por vin sekvi, forlasis sian altan ĉapon militistan, demetis sian longan glavon kaj akceptis viajn instruojn. Ĉiuj en la mondo diras, ke Konfuceo povas meti finon al la tiraneco kaj perfortaĵoj, sed la provo de Zilu mortigi la princon de la regno Wei finiĝis per malsukceso kaj lia kadavro estis dishakita en pecetojn ĉe la okcidenta pordego de Wei. Jen la sekvo de via instruado!

“Vi pretendas esti genio kaj saĝulo, ĉu ne? Sed vi estis dufoje forpelita el la regno Lu, kaj vi estis malpermesita eniri en la regnon Wei. Krome, vi estis alpremita al muro en la regno Qi kaj estis sieĝita inter la regno Chen kaj la regno Cai. Vi apenaŭ povas trovi en la mondo lokon, kie vi povus esti akceptita. Estis viaj instruoj, kiuj kaŭzis malfeliĉon al Zilu, kiu estis dishakita en pecetojn. Kiel majstro, vi povas fari nenion bonan kiel al vi mem, tiel ankaŭ al viaj disĉiploj. Kian valoron do havas viaj instruoj?

“El ĉiuj homoj, kiujn la mondo respektas, la plej prestiĝa estas la Flava Imperiestro, tamen li ruinigis la virton per siaj bataloj en Zhuolu, kun la sango verŝita sur la ebenajon vastan je cent lioj. Poste la plej fame konataj kaj imponaj monarkoj ankaŭ neniel povis konservi la perfektan virton: la reĝo Yao ne estis bona patro; la reĝo Shun ne estis fidela filo; la reĝo Yu suferis unuflankan paralizon; la reĝo Tang ekzilis sian suverenon; la reĝo Wu de Zhou renversis la reĝon Zhou de Shang; la reĝo Wen de Zhou estis malliberigita en

Jiuli. Ĉiuj tiuj ses monarkoj ĉasis potencon kaj profitojn je la kosto de sia virto; ili ĉiuj agis kontraŭ sia propra denaska naturo. Ilia konduto estas vere hontinda.

“Aliflanke, la tiel nomataj virtuloj, kiaj estis Bo Yi kaj Shuqi, estas alte laŭdataj kaj universale respektataj. Tiuj ĉi du homoj rezignis sian tronon en la regno Guzhu nur por trovi sin mortintaj de malsato ĉe la monto Shouyang, kie iliaj kadavroj estis lasitaj neenterigitaj. La ermito Bao Jiao, kiu penis beligi sian konduton kaj kritikadis la vulgaran mondon, mortis brakumante la trunkon de arbo. Shentu Di, kiu faris riproĉadmonon al la suvereno kaj ne estis aŭskultata, sin dronigis kun peza ŝtono sur la dorso en rivero, kie lia kadavro estis formanĝita de fiŝoj kaj molkarapacaj testudoj. Jie Zitui, el ekstrema fideleco, nutris sian malsategan reĝon en ekzilo per la peco da karno tranĉita el sia propra gambo. Kiam la denove surtroniĝinta reĝo turnis la dorson al sia lojalulo, Jie Zitui foriris en kolerego kaj brulmortigis sin brakumante arbon. Junulo Wei Sheng, atendante sian amatinon ankoraŭ ne alvenintan sub ponto por rendevuo, rifuzis foriri de tie. Li restis ankoraŭ brakumanta la kolonon de la ponto tiam, kiam la ŝvelanta riverakvo jam finis lian vivon. Ĉiuj ĉi tiuj ses pereis ne pli inde, ol buĉitaj hundoj, dronintaj porkoj kaj malsatmortintaj almozuloj, ĉar ili ĉiuj, lasante sin instigi de la deziro je la famo kaj honoro, mortis neindan morton. Ili forgesis, ke la plej grava por la homo estas certigi la longevivadon.

“Neniu ministro estas pli fidela ol Bigan kaj Wu Zixu. La unua havis sian koron elŝirita el la korpo kaj la dua estis dronigita en rivero. Kvankam ili akiris al si la reputacion pri lojaleco siatempe, tamen ili estis mokataj de postaj generacioj. La ĉi-supraj ekzemploj pruvas, ke ĉiuj, inkluzive de Bigan kaj Wu Zixu, meritas nenian laŭdon, nek respekton.

“Koncerne la argumentojn, kiujn vi uzas por min persvadi, ili havas nenian efikon sur min. Se vi dirus al mi aferojn pri fantomoj kaj supernaturajoj, ili estus super mia kompreno, sed vi rakontas al mi nur pri la homoj, pri kiuj mi jam multe aŭdis kaj bone scias.

“Nun mi rakontas al vi ion pri la sentoj komunaj al ĉiuj homoj. Estas nature kaj normale, ke la okuloj

deziras vidi kolorojn, la oreloj deziras aŭdi sonojn, la buŝo deziras gustumi gustojn, kaj la koro aŭ la menso volas esti kontentigita. Oni povas vivi, en plej longa okazo, ĝis la aĝo de cent jaroj; en mezlonga okazo, ĝis okdek jaroj; en plej mallonga okazo, ĝis sesdek jaroj. Oni povas maksimume ĝui nur kvar aŭ kvin tagojn da plezuroj en unu monato, se estas dekalkulita la tempo de malsanoj, la minaco de la morto, la maltrankvilo kaj zorgoj. La ĉielo kaj la tero estas senfinaj, dum la homa vivo estas limigita. La homa limigita vivdaŭro en la senfineco de la ĉielo kaj la tero estas tiel momenta, kiel la ekgalopo de rapidkura ĉevalo tra murfendo. Kiu ajn ne scias kontentigi siajn dezirojn kaj longedaŭrigi sian vivon, komprenas nenion pri la Taŭo.

“Ĉiuj viaj paroloj, Konfuceo, estas ĝuste tio, kion mi volas forĵeti. Fermu vian buŝon kaj tuj for de ĉi tie! La doktrino, kiun vi freneze semas ĉien, estas nenio alia ol lerta fabrikaĵo kaj hipokritaĵo, kiuj estas tute senutilaj al la homoj por konservi la denaskan naturon. Ne parolu plu!”

Espriminte dankojn foj-refoje Konfuceo foriris kun hasto. Kiam li eniris en la kaleŝon, la kaleŝa rimeno trifoj falis el lia mano. Kun malbrilaj okuloj kaj kadavre pala vizaĝo, li tenis la kapon klinita kaj, spiromanka, sin apogis sur la antaŭa brakapogilo de la kaleŝo. Kiam li atingis la orientan pordegon de la ĉefurbo de la regno Lu, Konfuceo hazarde renkontiĝis kun Liuxia Ji.

“Ha, jen vi!” diris Liuxia Ji. “Jam plurajn tagojn mi vin ne vidis. Laŭaspekte via jungitaro probable jam havis longan vojaĝon. Ĉu vi iris vidi Zhi?”

Konfuceo levis la kapon al la ĉielo kaj eligis profundan suspiron. Poste li diris:

“Jes.”

“Ĉu Zhi malkontentigis vin tiel, kiel mi avertis?” ree demandis Liuxia Ji.

“Jes, vi pravas. Mi ja kaŭteris min sen malsano, kiel oni diras, aŭ riskis karesi la kapon kaj la lipharojn de sovaĝa tigro, kiu preskaŭ formanĝis min!”

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Yi Qiao (Ĉinio)

*Palaco Somera**

— laŭ ĉinesko budhista dancisto**

Al Palaco Somera
bontempo primavera.
Montoj kun verdhel'
staras sub ĉiel'.

Ŝvebas la vento,
venas bonsento.
Ardas mia kor'
pompa kiel flor'.

**Palaco Somera estas la ĉina reĝa palaco en Pekino.*

***Budhista dancisto (ĉine: Pusaman): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo*

Espero

— laŭ ĉinesko flirta kanto*

Fervor', fervor'
torentas en la kor'.
En sunlumo trote
ni klopodas rote.
Tero, tero
plenas de espero



AM' TENERA

— laŭ ĉinesko flirta kanto*

Amo, amo
ardas kiel flamo.
Kisi restas grave,

ni pasias rave.
Vera, vera
estas am' tenera.

Kerube

— laŭ ĉinesko *flirta kanto**

Esper', esper'
burĝonas en prosper'.
Sanktan amon tenu,
mondon kore benu!
Nube, nube
lumas jen kerube.



**Flirta kanto* (ĉine: *Tiaoxiaoling*): ĉina fiksfirma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

Nokta Ulanbatoro

— laŭ ĉinesko *Belulino Yu**

La loko plenfabela
herbejo bela.
Jen nokta Ulanbator'
trankvilas zefire de favor'.

Tenera panjo nia
kun am' radia.
Kanzonon mildzumas ŝi
kun ĉarma antikva melodi'.



Belulino Yu (ĉine: *Yumeiren*) ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

Jadranka Miric (Serbio)

Post ŝtormo

Somera
subita ŝtormo
nigriĝis grandaj nuboj.
Koleris ĉielo. Ho
ekis malvarmo.

Kiel ĝi
venis tiel pasis. Ve
homoj esperis pli da
agrablaj tagoj. Sed ne
Varmis denove.

La knabin'
sur riverbordo
sunumas sian korpon.
Baldaŭ ŝi brunumos tre.
Por ŝi sufiĉe!

Sur river'
flosis la boat'.
En ĝi enamiĝanta
paro. Apud ŝi kat'
miaŭas pro malsat',

Fiŝetojn
fiŝkaptitaj de
junulo. Bonapetite
formanĝis la kat'. Sufiĉe
por ĉi matene!



— ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ —
Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)
Retadreso: vejdo@163.com
www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm

— ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ —